Esperanto - difino kaj celaro

(tradukenda nacilingven)

Esperanto estas la plej taŭga propono pri internacia lingvo.

Tiu aserto praviĝas, ĉar Esperanto estas la sola lingvo havanta la sciencajn ecojn, necesaj por plenumi tiun altvaloran socian rolon, nome: *neŭtraleco, ampleksa akcepto, garantio pri daŭripovo, logikeco, reguleco, klareco, facileco, efikeco pruvita en la praktiko, kaj interna ideo de homa frateco.*

neŭtraleco. Esperanto apartenas al neniu popolo kaj ne portas katenojn al religiaj, politikaj, ekonomikaj aŭ rasaj postuloj. La sola tereno kie Esperanto ne estas neŭtrala estas tiu de la socilingvistiko. En tiu tereno la apogantoj de Esperanto defendas la protektadon de kulturaj identecoj de ĉiuj homaj grupoj minacataj perdi sian idiomon pro forviŝigo kaj kun ĝi sian tutan historion kaj la valorojn de sia etno.

Daŭripovo. Pro sia propono esti *dua lingvo* kaj pro sia neŭtraleco, Esperanto havas ampleksajn ŝancojn firmiĝi kiel longdaŭra servilo, kiel ponto-linvgo inter homoj de malsamaj idiomoj kaj kulturoj.

La ***taŭgeco kaj efikeco*** de Esperanto estas pruvitaj en la praktiko. Ni konsideru la ampleksan jaran kalendaron de internaciaj eventoj, je kiuj Esperanto estas oficiala lingvo, la abundan kaj kreskantan sciencan kaj literaturan produktadon kaj ĝian uzadon kiel efika plurlingva tradukilo.

La ***logikeco kaj reguleco*** de Esperanto estas kvalitoj kiuj multe kontribuas por ĝia sukceso. La gramatikan strukturon de Esperanto oni povas lerni tre rapide, kompare kun etnaj lingvoj. La verbaj tempoj kaj modoj de Esperanto estas regulaj kaj ĝian vortaron oni konstruas per aldono de afiksoj al internacie konataj radikoj.

La ***klareco*** de Esperanto estas admirinda. Ĝia skribo estas tute fonetika (Oni skribas laŭ la aŭdita fonemo kaj prononcas laŭ la skribo, senescepte.) Tio ebligas al komencanto prononci ĝuste ajnan nekonatan esperantan vorton, sen timo erari. Ankaŭ en la semantika kampo Esperanto estas tre klara, pro ĝia logika kaj regula strukturo.

Facileco. El tiuj ecoj de Esperanto devenas ĝia rapida kaj facila lernado, kun ŝparo da tempo, energio kaj mono.

Defenda rolo de etnaj kulturoj. Pro tio ke ĝi estas propono pri transnacia, neŭtrala lingva komunikado, Esperanto ankaŭ plej bone ilas por defendi minoritatajn kulturojn kontraŭ malaperigo. La propono estas: Ĉiu homo kun sia idiomo kaj Esperanto kiel neŭtrala ponto inter individuoj de malsamaj lingvoj.

Pri la ***interna ideo***. Aldone al ĉiuj supre menciitaj mirindaj ecoj, Esperanto estas dotita, ekde ĝia naskiĝo, per speciala homliga elemento, kapabla veki senton de monda frateco inter siaj parolantoj, kiel revis ĝia iniciatinto, Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Tiun homligan elementon li nomis “la interna ideo”.

La ***celaro*** de Esperanto povas esti tiel sintezata: servi kiel pontolingvo en la komunikado inter homoj de malsamaj lingvoj, tiel kontribuante por la solidareco kaj respektema kunvivado inter la anoj de la homa familio.

Hejma tasko - Plenumu la hejman taskon de la sekva paĝo kaj montru ĝin al via instruisto en la sekva renkontiĝo.

Hejma tasko pri la enkondula leciono *(tradukenda nacilingven)*

Lernanto .....

Respondu laŭ via kompreno de la teksto kaj laŭ via penso pri la temo. ***(nacilingve)***

1 Kio estas Esperanto kaj kiu estas ĝia precipa celo?

.....
.....
.....
.....
.....
.....

2 Kial la ***neŭtraleco*** de Esperanto donas al ĝi avantaĝojn super la ceteraj lingvoj por meriti sian elekton por la rolo de internacia lingvo?

.....
.....
.....
.....

3 Kiel Esperanto povas helpi al la protektado de la minoritataj kulturoj?

.....
.....
.....
.....

4 Kiuj kvalitoj ebligas al Esperanto esti la plej facile lernebla lingvo?

.....
.....
.....
.....

5 Libere diru vian impreson pri Esperanto aŭ pri iu alia aspekto de la temo lingvo internacia.

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....